

TEA-BULTENO

14ª JARO **MAJO - JUNIO 2011** **NUMEROJ 5-6**

Neniu estas tiom stulta preferi militon ol pacon, ĉar en paca tempo la filoj enterigas siajn patrojn, dum militatempe estas la patroj kiuj enterigas siajn filojn.
Herodotus (ĉ. 484-425 aK)

Karaj TEA-anoj kaj Gelegantoj!
Nï hăo! Ne, ne, mi ne Volapuk-umas, nur mi deziras montri al vi mian "kvazaŭ perfektan" konon de la ĉina lingvo, post tri-semajna restado en Ĉinio. Mi devas tamen sincere konfesi, ke mia elparolscio limiĝas nur je du vortoj: nï hăo kaj xiè xie. Ĉu sufiĉaj por vagadi tra tiu vastega lando? Entute ne, sed ja sciatas, ke ni esperantistoj estas privilegia kasto, ĉar nia vehikla lingvo malfermas ĉiajn baritajn pordojn kaj forigas ĉiajn interkompreniĝajn problemojn. Kaj tiel fakte estis.
Celo de ĉijara vojaĝo estis - krom kompreneble duafoje viziti tiun eksterordinaran landon - partopreno en la Internacia Esperanto-Konferenco, organizita de OSIEK en Wuhan, ĉefurbo de Hubei-provinco. La organizadon estris kaj mastrumis la tre vigla esperantisto Trigo PENG, al kiu mi estas aparte danka, ne nur pro zorga atentemo al deziroj kaj bezonoj de la partoprenantaro, sed ĉefe ĉar li sukcesis aranĝi renkontiĝon kun mia tre kara, plurjara amikino Huang Guozhen, kun kiu mi ekkorespondis antaŭ pli ol deko da jaroj kaj kun kiu mi fine, unuafoje, intervidiĝis dum Pekina UK. S-ino Guozhen estas tre konata veterano de la loka asocio kaj fama en la filatela kampo: plurajn elmetaĵojn kun temo lige al Esperanto ŝi prezentis en ĉinaj ekspozicioj, gajnante plurajn premiojn. Kortuŝa estis nia renkontiĝo, dum kiu niaj komunaj sentoj de sincera amikeco renoviĝis kaj plifortiĝis.
IEK bone sukcesis laŭ diversaj vidpunktoj, kaj kleriĝaj kaj turismaj kaj interamikiĝaj: ĝi aparte aprecindis, pro la fakto ke finfine estis eblo ekkoni persone la eminentajn ĉinajn verkistojn kaj tradukistojn, valorajn kontribuantojn de LA GAZETO, nome sinjorojn Hu Guozhu kaj Shi Chengtai.
Plej impresis min el la prelegoj pri la ĉeftemo: "Ĉina Saĝo" - interalie ĉiuj ege pensigaj, same interesaj - tiu farita de s-ro Hu Guozhu, "Iom el la han-lingvo", per kiu li konatigis al ni la 'Pagodan' vers-sistemon. Ĉu vi scivolemas pri ĝi? Ĉu vi scias, ke ankaŭ la fama hungara poeto Julio Baghy versis 'pagode'? Nu, paciencu, ĉar klarigoj venos venontbultene aŭ dum niaj vendredaj renkontiĝoj ĉe sidejo de via Triesta E-Asocio. Jam nun mi informas vin, ke temas pri tre originala unikaĵo, kiu - eble - vin defios elprovi mem!
Dum la tuta vojaĝo, kiu komenciĝis en Ŝangajo, Edvige kaj mi estis akompanataj de la esperantista amiko Nan Hai, kiun mi ekkonis en 1990a jaro en Havano, dum la tiama UK. Jam en Ŝangajo ni estis kun esperantistoj, kiuj varmege nin akceptis, ĉiĉeronis, interpretis, kaj regalis per neforgesebla tagmanĝo, 15-plada. Post tiu modernega, vastega, 22-miliona urbo trajna veturado al Nankino, la loĝloko de Nan Hai, kaj ankaŭ tie same varma bonvenigo de mia amiko kaj ties familianoj kaj renkontiĝo kun aliaj esperantistoj, inter kiuj ankaŭ Dennis Keefe, kiu, interalie, instruas esperanton en la Nankina Universitato.
Post dutaga restado en tiu urbo, forflugo al Chongqin kaj enŝipiĝo por krozado laŭ la Lazura Riverego (Yangzi). Bedaŭrinde vetero iomete nin perfidis pro abunda nubaro kaj nebularo, sed tamen okuloj kaj spirito satiĝis je mirindaj naturaj spektakloj, eĉ se iom vualitaj per griza koloro.
Ni elŝipiĝis en Yichang, de kie per trajno ni alveturis Wuhan-on. Post la konferenco restis ankoraŭ tri tagoj por vizito de aliaj vere eksterordinaraj lokoj, kiaj Luoyang, la Monakejo de Shaolin, la Grotoj de Longmen kaj la antikva urbo Kaifeng. De tie per trajno al Ŝangajo, ĉe kies stacidomo atendis nin tre ĉarma esperantisto s-ro Wang Min Hao, kiu solvis denove, danke al nia komuna lingvo, ĉian problemon pri alveturado al la flughaveno.
Do, tre skize mi ĉi-foje rakontis pri sufiĉe longa trairado de parto de Ĉinio, sed tiom multas la priparolindaj vidindaĵoj kaj la spertoj travivitaj, tiom impresa la ekgustumo de tiel nekonataj kulturo kaj historio, ke malsufiĉas ĉi paĝoj por ĉion priskribi. Detalajn impresojn kaj raporton pli ampleksan oni ricevos dum la prezentado kaj de filmoj kaj de fotoj dum venontaj asociaj renkontiĝoj. Tiam bona okazo por ekscii iom pli pri Ĉinio kaj pri la ebloj donitaj de nia kara lingvo Esperanto. Via redaktanto Elda

Karstaj Tagoj 2011

Triesto atendas vin, deziranta prezenti sian unikan teritorion

Ĉeftemo de tiu ĉi renkontiĝo estos la karsta medio: vi ekkonos ĝiajn plej sekretajn ecojn, vi flaros la parfumon de ĝia flaŭro laŭirante padojn nekonatajn al normalaj turistoj, vi enamiĝos en ĉi tiu eksterordinara naturo, kiu ŝajnas esti kruta kaj avara, sed male, grandanime, ĝi povas siajn trezorojn malkaŝi al tiuj kiuj kapablas ĝin ami kaj precipe respekti!

Ĵaŭdon la 2an de junio
Ekde la 10ª horo matene: alveno de partoprenantoj kaj enhoteliĝo.
Posttagmeze: ĉiĉeronado tra la urbo. Vespere: komuna vespermanĝo ĉe Triesta Esperanto-Asocio kaj prezento de bildoj pri Triesto kaj ĉirkaŭaĵoj

Vendredon la 3an de junio
Per aŭtomobiloj al belvidejo de *San Lorenzo*; ekiro laŭ la jama fervojo; daŭrigo ĝis *Bottazzo*; promenado laŭ valo Rozandro. Vespermanĝo en rifuĝejo *Premuda*.

Sabaton la 4an de junio
Laŭ la padoj de Naturo kaj de Salvio: per aŭtobuso, direkte al *Prosecco*. Promenado laŭ la pado de Naturo ĝis *Santa Croce* kaj de Salvio, de *Santa Croce* al *Aurisina*.

Dimanĉon la 5an de junio
Sekvante la spurojn de dinosaŭroj: per aŭtobuso al *Villaggio del Pescatore* (Fiŝkaptista Vilaĝo); vizito de Paleontologia ejo; promenado laŭ la pado *Rilke*.

Kaze de malbona vetero, povos fariĝi ŝanĝoj en la programo.

Pluajn detalajn informojn petu de: nored@tiscali.it aŭ testudo.ts@gmail.com
aŭ poŝte:
Triesta Esperanto-Asocio
Via del Coroneo 15
IT-34133 Trieste




Laste trovitaj!

Ankoraŭfoje poŝtkarto, el la serio de esperantistaj karikaturoj desegnitaj de grafikisto Jean Robert kaj eldonitaj de Alice-Leontine Farges. Francino el Liono, kie ŝi direktis Esperanto-Oficejon, s-ino Farges vigle disvastigis Esperanton inter komercistoj kaj, i.a., organizis, dum pluraj jaroj, propagandan budon ĉe siaurba Foiro.



Ĉifoje temas pri: Émile Boirac, franca esperantisto, doktoro pri filozofio kaj rektoro de Akademio de Esperanto. Naskiĝis la 26[an] de aŭgusto 1851 en Guelma (Alĝerio) kaj mortis la 20[an] de septembro 1917 en Diĵono. Li estis nomita rektoro de la Universitato en Grenoble (1898) kaj en Diĵono (1902). Lia ĉefa filozofia verko estas "La Ideo de la Fenomeno", per kiu li penis akordigi la teoriojn de du elstaraj samnaciaj filozofoj, Renouvier kaj Fouillée, pri la substanco, la realeco de la ekstera mondo kaj idealismo–realismo. Krome li kreis la Instituton elektroteknikan de Grenoble, kaj la "privinan" Instituton de Diĵono.



Li estis varbita al Esperanto per leteroj de Méray[1)]. Sekve li komencis labori senlace por la internacia lingvo. Li prezidis la 1[an] Universalan Kongreson en Boulogne-sur-Mer (1905). Elektita de L. L. Zamenhof kiel prezidanto de la Lingva Komitato, li subtenis energie la fundamentajn principojn dum la Idistaj atakadoj. Lia raporto dum la Kvara Kongreso en Dresdeno (1908) pritraktas lian partoprenon en la laboroj de la "Delegacio por alpreno de la lingvo internacia"[2)] kaj intertempaj problemoj.

En 1912 Boirac fondis, kune kun aliaj, mondan asocion de spiritismaj Esperantistoj kaj estis ties unua prezidanto.

En 1909 estis eldonita lia granda Vortaro Esperanto-Esperanta kiu, kiel legeblas en la Enciklopedio de Esperanto (EdE, 1934), estis "unu el la plej gravaj libroj por la lingvolaborantoj".

EdE plie juĝas: "Boirac sin montris unu el niaj plej bonaj stilistoj kaj spertuloj. Per sia fluanta voĉo kaj ridetanta bonhumoro, kaj eble per sia psika influo, kune kun sia persona aŭtoritato, li ĝuis grandan influon en la Esperantistaj kunvenoj, kaj estis ĉiam tre atente aŭskultata. Li fondis diversajn grupojn kaj altiris al Esperanto gravajn Universitatanojn".

Li verkis multajn artikolojn en revuoj francaj (speciale en la "Revuo Pedagogia") kaj esperantaj kiel "La Revuo" kaj la "Oficiala Gazeto Esperantista" kaj multon tradukis, i.a. verkojn de Leibnitz, Molière, Van Dyke.

*Danke al publikig-permesoj donitaj de la aŭtoro, **Kossi Amékowoyoa KOMLA-EBRI**, kaj de eldonejo **Edizioni Dell'Arco**, jen la tria kaj lasta anekdoto, el la libro* Embarasismoj *«Ĉiutagaj embarasoj blanke kaj nigre». Aliaj libroj de Komla-Ebri troveblas en viaurbaj librejoj.*



EDZIĜO NAJBARA

GARANTIAS DE ERARO

Kiam mi estis en Francujo, mia profesoro kun kredo liberalisma/avangarda, kiu ege simpatiis min, ofte invitadis min pasigi la semajnfinojn ĉe sia familio. Tiutempe, tre profunda amikeco ligis min al liaj gefiloj kaj neniam ni perdis okazon kunestadi.

Iun vesperon, post televida raportaĵo pri rasisma maltoleremo, la "prof", surpodiiĝinta, deklaris:

- Mi ne sukcesas envere kompreni, kiel povas esti, ke homoj estu rasismaj. Vidu, ci estas inter ni kiel ci estus unu el niaj gefiloj. Ni traktas cin egalmaniere, ni alparolas cin ĉiam malhavante ian ajn superecan sintenon, ni manĝigas cin ĉetable kune kun ni…

En mia memo mi ekpensis: "multajn dankojn!", dum li konkludis:

- Neniam ni prikonsideris cian haŭtkoloron. Do, vidu, ni ne estas rasistoj.

Mi prikomentis:

- Vidu, profesoro, foje la homoj estas rasistoj eĉ ne konsciiĝante pri tio, almenaŭ ĝis kiam ili mem ne estas implikitaj. Ni supozu, ekzemple, ke mi enamiĝis en vian filinon kaj, reciprokite, mi petus vian permeson ŝin edzinigi: kion vi dirus?

Li respondis:

- Be! … tio estus tute alia afero!

Nia konversacio grundis tie.

Nura strangaĵo estis, ke ekde tiu vespero neniam plu li invitis min siahejmen.

Kiu scias pro kio!

[1)] Charles Méray, fama matematikisto, aŭtoro de tute originala traktato pri infinitezimala analizo, elpensinto de nova metodo por instruado de geometrio. En 1900, post renkontiĝo kun Esperanto, li iĝis tuj ties fervora varbanto, propagandante la lingvon ĉefe en Universitata medio en Diĵono, sed ankaŭ en Parizo. Li altiris al Esperanto multajn gravulojn, kiel Bourlet, Appell, Sebert, Boirac mem kaj plurajn aliajn.

[2)] "Delegacio por alpreno de la lingvo internacia" - iniciatita dum tutmonda ekspozicio en Parizo (1900), de la francoj Louis Couturat kaj Leopold Leau, post konstato pri lingvaj malfacilaĵoj dum internaciaj kongresoj. En pli postaj jaroj, pri la Delegacio, Prof-ro Boirac tiel sin esprimis: La delegacio estas "tre lerte kombinita teatraĵo, kies scenojn 2-3 personoj direktis post la kulisoj".

Fontoj: Vikipedio kaj Enciklopedio de Esperanto (1934)

Feliĉo estas kiel papilio: se vi ĝin postkuras, neniam vi sukcesos ĝin kapti, sed, se vi sidas trankvile, eble ĝi haltos sur vi.
Nathaniel Hawthorne (Usona verkisto - 1804-1864)

PLIOFTAJ PARONIMOJ

Marinko Ĝivoje en sia libreto ESPERANTONIMOJ (dua eldono, EDISTUDIO 1979) kolektis serion da antonimoj, homonimoj, paronimoj, sinonimoj, tre utilaj por pliriĉigi la esprimadon kaj krome solvi dubojn, malcertojn, embarasojn pri ekzakta skribado aŭ signifo de apartaj, specifaj vortoj.
En TEA-BULTENO aperos el tiu libreto elekto de tiuj plioftaj "ONIMOJ", cele helpi tiamaniere al pli bona, korekta, flua komunikado – kaj voĉa kaj skriba – de niaj asocianoj.
Vi trovas ĉifoje unuan vicon da "Paronimoj", nome tiuj vortoj preskaŭ samsonaj inter ili, sed signife malsamaj, esperante je favora akcepto kaj intereso.

Abdomeno korpoparto de vertebruloj aŭ malantaŭa korpoparto de diversaj senvertebruloj
Abomeno forta antipatio

Adapti konformigi unu aferon kun la alia
Adepto sekvanto de doktrino
Adopti alpreni iun kiel sian filon

Agao turka oficiro
Ago montro de forto aŭ kapablo
Aĝo la vivtempo, kiun iu havas
Aĝio valordiferenco de mono inter nominala kaj efektiva valoro
Aĵo konkreta afero

Aero la gaso kiun oni enspiras
Areo surfaco de difinita terpeco

Agordi reguligi la kordojn de muzikinstrumento
Akordi esti sam-pensa, -senta kun alia

Akcelo plirapidigo de ago ks; stimulado
Akselo subbrako

Akneo genra nomo de haŭtaj afekcioj
Akno ruĝa ŝvelaĵeto sur haŭto

Akuŝintino virino kiu naskis
Akuŝistino virino prizorganta akuŝojn

Aldo alta akuta voĉo
Alto vertikala dimensio
Alteo herbo el malvacoj *(Althaea)*

Aligi aldoni, almeti
Aliĝi aldoniĝi, almetiĝi, aniĝi
Aliigi sanĝi, modifi
Alligi kunigi aferojn aŭ personojn

Alojo miksaĵo de kunfanditaj metaloj
Aloo sukulenta planto *(Aloe vera)*

Amaso granda kvanto; aro da homoj
Anaso birdo
Ananaso frukto de tropika arbo

Angilo serpentsimila manĝebla fiŝo
Angio tubo en animala korpo

Aperi subite sin montri; esti publikigita
Aperti esti nekovrita, libera

Aperturo malfermaĵo, fendo
Apreturo substanco por apreti

Arbitracio decido pri grava diskutaĵo
Arbitraĝo spekulacia operacio
Arbitro eco de io arbitra

Arĉo vergeto kun ĉevalharoj por ludi kord-muzikilojn
Arko kurblinio; parto de cirklo; pafilo; volbo
Arkeo la ŝipo konstruita de Noa

Ardeo granda marĉa birdo
Ardezo nigregriza ŝtono tavola por tegmentoj
Ardo varmego

Argano metata ĉarpentaĵo ĉe petrolputo
Argono kemia elemento

Arkado arkaĵo sur kolonoj
Arkaĵo arkforma konstruaĵo; volbo
Arkano sekreta instruo aŭ rito

Arseno elementa metaloido As
Arsino kemia kombinaĵo de As
Arŝino pasinteca rusa mezurunuo de longo

Artiklo varspeco, komercaĵo
Artiko korpoparto; mekanika sistemo
Artikolo vorteto "la"; teksto en gazeto; sekcioj en leĝo

Asterio marstelo
Asterisko steleto uzata en presarto
Astero kreskaĵa genro de kompozitoj *(Aster)*
Asteroido planetoido
Astro ĉiela korpo

Atenci provi mortigi iun aŭ detrui ion
Atenti direkti sian spiriton al io; sekvi
Atendi resti ĝis alveno aŭ okazo; antaŭvidi ion

Aŭriklo orelparto
Aŭriko velospeco
Aŭrikulo *(Bo)* primolo; *(Zo)* marlimako
Aŭrikulario *(Bo)* orelfungo *(G. Aŭricularia)*

Bando aro da muzikantoj, rabistoj ks
Banto nodospeco el rubando

Bano likvaĵo en kiu oni sin banas
Bagno punlaborejo

Barako ligna dometo
Barakto skuado por liberigi sin

Barbo vizaĝhararo
Bardo kelta poeto-kantisto
Barko boato; ŝipeto
Barto korneca lameno ĉe balenoj

Barelo ventroforma ujo por vino ks
Barilo haltigilo antaŭ iu aŭ io
Berilo juvelŝtono
Berilio kemia elemento, metalo
Borilo ilo por bori

Bareto eta baro
Bereto ronda drapĉapo
Bireto oficiala kapvesto de pastroj ks

Beno ago aŭ vortoj de benanto; Difavoro
Bieno tera posedaĵo
Bono utilo; helpo; bonaĵo

Biskoto rebakita pantranĉo
Biskvito dufoje bakita kukspeco; senglazura porcelano

Bluso popolkanto
Bluzo vestospeco

Bokalo vazo uzata en farmacio
Pokalo funelforma trinkvazo; premio

La renkontiĝon aranĝas ELF-AREK kune kun KAVA-PECH, la agentejo de Petro Chrdle, lige al la 14ª Foiro de Poŝtmarkoj, Moneroj, Telefonkartoj, Mineraloj kaj kolektaĵoj en Prago kun eblo de vizito de la Esperanto-Muzeo en Svitavy.
La renkontiĝejo: Kiel renkontiĝejo servos tristela hotelo Krystal, kie la partoprenontoj tranoktos kaj kie okazos ankaŭ la kunsidoj.
Provizora programo:
Ĵaŭdo la 8ª de septembro: alveno, neformala vespera babilado.
Vendredo la 9ª de septembro: dumtage vizito de la Foirejo (aŭ individua programo en Prago por nekolektantoj), vespere la 1-a kunsido de ELF-AREK.
Sabato la 10ª de septembro: gvidata ekskurso tra la historia kerno de Prago, vespere la 2-a kunsido de ELF-AREK.
Dimanĉo la 11ª de septembro: matene, trajna forveturo al Svitavy, vizito de Esperanto-Muzeo kaj Urba muzeo, enhavanta ekspozicion pri la plej fama naskito de Svitavy kaj savinto de multaj judoj Oskar Schindler; trarigardo de la centro de Svitavy kaj, vespere, reveno al Prago.
Antaŭviditaj kostoj: Aliĝkotizo - 20 €.
Tranoktoj en la hotelo Krystal (inkluzive de matenmanĝo): en unulita ĉambro 32 €/nokto; en dulita ĉambro 23 €/nokto kaj persono; en trilita ĉambro 19 €/nokto kaj persono. Komunaj vespermanĝoj antaŭ la kunsidoj: po 12 €.
ATENTU: eblas daŭrigi la restadon en Ĉeĥio partoprenante EKOTUR (Ekoturisman renkontiĝon) 2011/09/11-18 (por piedturistoj kaj biciklantoj). Pli da informoj ĉe www.kava-pech.cz/ekotur. La kompletajn informojn kaj aliĝilojn vi trovos baldaŭ ĉe www.kava-pech.cz/kolektantoj aŭ petu ilin de Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice, CZ-25229 Dobřichovice, tel.: +420 257 712 201 aŭ +420 736 645 455.
Interesiĝantoj povas alturniĝi ankaŭ al Elda: testudo.ts@gmail.com; ++39 040 398562



Poŝtmarko por enlanda elsendo

Laste aperis en ... Slovenio!
Jen interesa informo por filatelistoj. Antaŭ monato estis private eldonitaj ĉi poŝtmarkoj. Iniciatis la eldonon la Fervojista Esperanto-Societo (Maribor), omaĝe al la 20-jara jubileo de memstara Ŝtato Slovenio.
Sur ambaŭ poŝtmarkoj aperas la jenaj skribaĵoj:
Supre*: FERVOJISTA ESPERANTO SOCIETO*; sube: 20 jaroj de memstara Slovenio, en esperanto; 20 let samostojne Slovenije, slovene.
La bildo montras grandrapidan trajnon kurantan ĉirkaŭ la mondo: tio simbolas la deziron, ke fervojo fariĝu transporto pli kaj pli uzebla, ĉar ekologie dezirinda. La diferenco inter la du poŝtmarkoj rimarkeblas ĉe la fono, pro la malsamaj koloroj de SLOVENIJA (nigra ĉe unu, blanka ĉe la alia) kaj la literoj A por enlanda sendo kaj C por la eksterlanda.



Poŝtmarko por eksterlanda elsendo

Kiuj deziras ricevi ilin, povas alturni sin rete al fes.maribor@amis.net aŭ poŝte al: Esperanto - pp.123 – 9220 Lendava - Slovenio. La du poŝtmarkoj kostas 2,50 eŭrojn, al kio aldonendas la sendokostoj.

Multlingveco: Lingvo, Povo kaj Kono

24-25 junio 2011
Palazzo Feltrinelli - Via Castello 3
Gargnano del Garda (Brescia)

Zorge de Milana Universitato kaj kunlabore kun Itala Esperanto-Federacio kaj aliaj Universitatoj aŭ Institutoj (Univ. de Ĝenevo, Associazione eurolinguistica Sud, Centre d'études linquistiques pour l'Europe, INKOJ. Interlingvistikaj Kajeroj, GSPL Società di Linguistica Italiana k.a.) oni pritraktos jenan temaron:
Lingvo kaj povo. Ĉu la hierarkia sinteno, kiu instigas la esploristojn utiligi nur *unu saman naturan lingvon*, limigas la egalecon inter esploristoj apartenantaj al malsamaj lingvaj komunumoj kaj/aŭ kondiĉigas la temojn de la kultura kaj scienca esplorado?
Multlingveco kaj filozofio. Kiu estas la rilato, kiu interligas la esplor-temojn pri filozofio kaj la lingvon, en kiu oni plenumas ilin (t.e. la lingvo de la esploristo mem kaj/aŭ la lingvo, kiun li elektas aŭ estas devigata elekti)? Ĉu la traduko de problemoj kaj tekstoj en filozofio kunportas limigojn aŭ riĉigojn?
Plurlingveco kaj kon-kapabloj. Ĉu la kapablo utiligi regule pli ol unu lingvon efikas je la rezultoj rilataj al kon-kapabloj, kiuj preteriras la lingvajn kapablojn mem?
La situacio de artefaritaj kaj planitaj lingvoj. Ĉu konstruita lingvo (*conlang*) helpas protekti la lingvan egalecon interne de multlingvaj medioj kiel la Eŭropa Komunumo? Ĉu la kazo de denaskaj parolantoj de konstruita lingvo kiel gepatra lingvo liveras kontraŭekzemplon al la ĉefa paradigmo de la nuntempaj lingvistiko kaj filozofio de la lingvo? Ĉu la konstruado kaj/aŭ la uzado de konstruitaj lingvoj implicas demandojn esence filozofiajn, kiel kategoriajn taksonomiojn kaj ontologiajn antaŭsupozojn, aŭ, plie, logikajn, politikajn kaj artismajn utopiajn idealojn?

Scienca Direktado: Paolo Valore (Filozofia Fako, Studuniversitato de Milano).

Scienca Komitato: D. Astori (Klasika kaj Mezepoka Filologio, Univ. de Parma); R. Corsetti (Universitato "La Sapienza" Roma kaj FEI-Prezidanto); G. Iannaccaro (Humanscienca-komunikada Fako, Univ. de Milano Bicocca); M. Gazzola (Lernejo pri tradukado kaj interpretado, Univ. de Ĝenevo); F. Pennacchietti (Univ. de Torino); R. Pettoello (Filozofia Fako, Univ. de Milano). Pliaj informoj ĉe: www.filosofia.unimi.it/meeting/index.php/esperanto



En ĉi antaŭaj monatoj multajn receptojn mi ricevis de diversaj amikoj, tial nepras ke mi donu al tiuj iom pli da spaco. Temas pri tre apetitovekaj bongustaĵoj, kiujn - espereble - vi bonvolos tuj eksperimenti por ĝojo via kaj de viaj familianoj!

VIGLA PASTAĴO

Ĉu vi aŭdis kelfoje citi la legomojn "*puntarelle*"? Aspekte ili similas al pintoj de asparagoj, sed ili estas kune kreskantaj ĉe la kerno de tiu aparta legomo nomata "stucita cikorio" (itale: cicoria cimata [ĉikorja ĉimata]). El tiuj pintoj oni eltranĉas nur la parton ene kavan, por ilin gustumi salate: krudaj – kiel ankaŭ la fenkoloj same gustumiĝas – aŭ boligitaj.
Per tiuj ĉi "*puntarelle*" mi sukcesis pretigi tute simplan, specialan kaj tre bongustan kondimenton por spagetoj. Eble nenio speciala, sed per ĝi oni povas anstataŭigi tiun kutiman kaj ofte tede surtabligitan tomato-saŭcon.
Bonvolu provi: simpla kaj ege rapida recepto de VIGLO

INGREDIENCOJ *(POR 4-6 PERSONOJ)*

450 g	da spagetoj
½ kg	da tranĉitaj "*puntarelle*"
6 kulerplenoj	da olivoleo
1	ajlero
1 manpleneto	da peklitaj kaporburĝonoj
2	peklitaj anĉovoj

PREPARADO

Duonbrogu "*puntarelle*"-n dum 5 minutoj en salita akvo.

Purigu per akvo la kaporburĝonojn kaj anĉovojn.

Intertempe, en larĝa pato, varmigu olivoleon, en kiu vi dispremis la ajleron, kaj aldonu la kaporburĝonojn, la dispecigitajn anĉovojn kaj la "*puntarelle*"-n. Kuiru la spagetojn en salita akvo, 2 minutojn malpli ol la fiksitan tempon. Ilin senakvigu kaj tuj enversu en la paton, saltigante la tuton por ĝin plene kunmiksi kun la kondimento.

Do, finpreta la pastaĵo.

Notindas, ke la legomo, tiamaniere preparita, tre harmonie kuniĝas ankaŭ kun kuskuso. Provu kaj ... bonan apetiton!

DOLĈAĴO EL MILIO (de Rosanna)

INGREDIENCOJ

1 litro	da lakto
250 g	da milio
60 g	da butero
100 g	da sukero
2	ovoj
iom	da pinfruktoj k rosinoj, citrona aŭ ruma aromaĵo

PREPARADO

Kuiru la milion en la lakto, ĝis ties kompleta sorbiĝo. Elprenu la poton el la fajro, aldonu al la milio kaj buteron kaj sukeron kaj sekve lasu la tuton malvarmiĝi. Tiam aldonu la ovojn kaj tre energie miksu la pastaĵon. Versu ĝin en kukujon, antaŭe buterumitan kaj panerumitan. Baku la dolĉaĵon en forno je 175° da temperaturo, dum ĉirkaŭ duonhoro, ĝis formiĝas bruna krusteto sur la surfaco.

KOCH el rizo

Tiu ĉi dolĉaĵo, nomita *Coch* aŭ *Koch*, estas io inter kremkaĉo kaj sufleo, kies origino estas sendube aŭstra. Ĝi atingis Trieston sekve de la enveno de mezeŭropaj familioj, ĉi tien translokigitaj de la imperia administracio. Sed ĝi ne estis larĝe akceptata kaj ne tiom fascinis la triestajn kuiristinojn, tial malmulte en Triesto ĝi estis/as konata. Mi lernis ĝin kuiri de mia patrino, kiu - siavice - ricevis la recepton de sia patrino. Miaopinie indas elprovi ĉi tiun dolĉaĵon: mi firme kredas, ke viaj familianoj ĝin volonte bonvenigos en sia familia menuo.

INGREDIENCOJ

¾ litro	da lakto
200 g	da rizo
1	vanila guŝo
100 g	da butero
80 gr	da sukero
4	ovoj
100 g	da rosinoj
	citrona raspitaĵo

PREPARADO

Trempu la rosinojn en varmeta akvo, al kiu vi aldonis iom da rumo por dolĉaĵoj.
Enmetu en poton la lakton, 1/8-on da akvo, du pecetojn de citrona ŝelo kaj unu vanilan guŝon. Surfajrigu ĝin kaj, post ekbolo, enversu la rizon, malpliigu la fajron kaj boletigu ĉ. 30 minutojn. Kiam la rizo moliĝas kaj densiĝas ĝis kvazaŭa kremo, lasu ke la tuto malvarmiĝu. Kiam ĝi estos malvarma, enversu la rosinojn, antaŭe sekigitajn per tolaĵeto aŭ viŝ-papero kaj farunitajn. Miksu vigle buteron kaj sukeron, ĝis akiro de ŝaŭmanta kremo al kiu vi aldonos, unu post la alia, la kvar ovo-flavojn. Versu la miksaĵon, iom post iom, en la rizon kune kun la citrona raspitaĵo. Laste kirlu la ovoblankojn, kiujn vi tre delikate kunmiksos al la kunmetaĵo.
Buterumu kaj panerumu rondan kukujon kaj la tuton vi baku dum 3/4 da horo en forno, je 180-grada temperaturo.
Gustumu ĝin varmetan aŭ malvarman, laŭplaĉe. Senpacience mi atendas vian prian komenton.

Solvo de la divenludo aperinta en marta-aprila bulteno

LA PUNKTO

Nur nia brava TEA-anino Amalia sukcesis ĝin solvi. Gratulojn al ŝi! Ĉu tro malfacila? Bone, ne gravas, nun provu per tiu ĉi suba, nur atentu, kion diras Viglo!
Rigardu la kvin sinsekvojn de numeroj sube, kaj diru, per kiu numero eblas anstataŭigi la demandosignon, laŭ logika kriterio.



3 > 5 > 9
2 > 4 > 8
7 > 9 > 13
5 > 7 > 11
9 > ? > 15

Bonan amuziĝon!

Maloftaj estas la personoj, kiuj uzas sian menson; malmultaj tiuj, kiuj uzas sian koron, kaj solsolaj tiuj, kiuj uzas ambaŭ.

Rita Levi Montalcini (sciencistino, 22 aprilo 1909)

Tie kaj tie pluketante...

Kultura Spektaklo en Venafro
Doktoro Esperanto – Voĉo tra la mondo

Kadre de la Kunveno: TUTMONDIĜO KAJ IDENTECO – DE DIALEKTO AL ESPERANTO, kiu okazos vendredon la 20ª de majo en Venafro, Via A. De Bellis n. 2, ekde la 17ª horo, zorge de la Kulturasocio 'Auser' kaj Esperanto-Asocio 'Tri Steloj' (San Vittore del Lazio – FR) kun subteno de la Komunumo de Venafro, estos prezentita la teatraĵo "Doktoro Esperanto – Voĉo tra la mondo", monologo de la tre brava aktoro Mario Migliucci. Intervenos Amerigo Iannacone, Prezidanto de la Asocio 'Tri Steloj', Maurizio Vitiello, sociologo kaj artkritikisto, kaj Renato Corsetti, FEI-Prezidanto.

64ª Kongreso de IKUE -Zagreb, Kroatio
de la 16ª ĝis 22ª de julio 2011

Ĉefa temo: "Vi estos malamataj de ĉiuj pro mia nomo. Kaj eĉ unu haro de via kapo ne pereos". (Luk 21, 17-18)
Subtemoj: •Persekutoj kontraŭ kristanoj en la mondo; •La atesto de la martiroj dum la historio de la Eklezio; •La signifo de la martirigo; •La atesto de Johano Paŭlo la 2ª en la jaro de lia beatproklamo (Pardoni kaj Pardonpeti - la mesaĝo de JPII; 25-jaroj de la Spirito de Asizo, k.a.); •Interreligia dialogo en dokumentoj de la Katolika Eklezio; •Dialogo por la repacigo: kiun rolon havas Esperanto?

Informoj ĉe kroatio2011@ mail.com
aŭ www.ikue.org

Ni kantu, kantu kaj kantu!!!
Kantado plibonigas onian vivon!
Nun ĉe Kantaro-vikio pli ol 2000 kantotekstoj!

Ekde la jaro 2003 'kantaro-vikio', alinome la 'libera kantaro', estas loko por ĉiu muzikema esperantisto, kie eblas trovi multegon da kantotekstoj, notoj, videoj kaj aliajn muzikaĵojn. Funkcianta kiel vikio, ĝi ebligas komunan laboron de esperantistoj el diversaj mondopartoj.
En la komenco la kantaro-vikio havis nur kantotekstojn, sed nun krom tekstoj oni povas trovi ankaŭ muziknotojn, akordojn, tonsilabajn melodiojn, midi-dosierojn kaj eĉ spekti videojn.
En kantaro-vikio troviĝas ankaŭ paperaj kantaroj. En speciala paĝo vi povas trovi liston de paperkantaroj kaj la kantotekstojn en ili.
Kiuj uzas kantaro-vikion? Ho! Komencantoj, gvidantoj de kursoj, amatoraj ludantoj, mem aŭtoroj kaj muzikistoj kaj finfine ĉiuj muzikemuloj! Se vi antaŭe ne vizitis nian vikion, ne prokrastu, eble vi trovos ĉe ĝi delonge serĉatan amatan kanton!
Internacia teamo de kunlaborantoj, sen kies helpo nuna granda atingo ne eblus, invitas vin al kantaro-vikio jubilea!
Dankon al niaj viki-uzantoj, kiuj riĉigas nian kantaron dum longa tempo, dankon al ĉiuj aŭtoroj, kiuj permesis publikigi siajn verkojn tie, dankon al ĉiuj retumanoj, kiuj tajpis eĉ unu literon tie, dankon al vizitantoj, kiuj serĉadas kaj trovadas kantojn tie.
Grandan dankon! - Kaj nun venu, vidu, kunkantu! - Adreso de la libera kantaro: http://kantaro.ikso.net/ Iniciatinto, ĉefa laboranto kaj multjara motoro de la projekto estas Ljoŝa Kuznecov, ka2pink@gmail.com, el Rusio.

(Fonto: Ret-Info www.eventoj.hu)

Maja Programo

3 mardo	**14h00** - **Tele4** - Rubriko "El la kofro de l' tempo" - intervjuo kun Roberto Ive kaj Edvige pri Mongolio **17h30** - Posttagmeza kurso
6 vendredo	**20h00** - Babilvespero
10 mardo	**17h30** - Posttagmeza kurso
13 vendredo	**20h00** - Bildoj pri la mondo
17 mardo	**17h30** - Posttagmeza kurso
20 vendredo	**20h00** - "Influo de Volapuko sur Esperanto 1880-1885" - prelego de Roberto Tresoldi
24 mardo	**17h30** - Posttagmeza kurso
27 vendredo	**20h00** - Pri Karstaj Tagoj
28 sabato	**9h30** - Vizito de la ekspozicio "Florstila Trieste", ĉe *Salone degli Incanti*. Rendevuo antaŭ la ĉef-enirejo. Anonciĝu ĉe Rosanna (04043864-3403603291).
31 mardo	**17h30** - Posttagmeza kurso

Junia Programo

2 ĵaŭdo **3** vendredo **4** sabato **5** dimanĉo	Komenciĝas la programo pri Karstaj Tagoj (vd. je la 1-a paĝo). Ĉiu ajn povas en ĝi partopreni, parte aŭ komplete: bonvolu alturniĝi al Rosanna, kiu donos ĉiajn informojn kaj detalojn.
7 mardo	**17h30** - Posttagmeza kurso
10 vendredo	**20h00** - Raportoj pri Ĉinio
14 mardo	**17h30** - Posttagmeza renkontiĝo
17 vendredo	**20h00** - El Esperanto-Gazetaro
21 mardo	**17h30** - Posttagmeza renkontiĝo
24 vendredo	**17h30** - Somera Festo!
28 mardo	**17h30** - Posttagmeza renkontiĝo

Atentigo!

Ekde la 1ª de julio ĝis la fino de aŭgusto la sidejo estos fermita. Vin atingos kompreneble la TEA-Bulteno. Sed jam nun notu ĉi rendevuon: sabaton la 23an de julio, ekde la 18ª horo, ĉiuj ĉe Anita - ŝi varme nin invitas por kunestado plezuriga, amika, amuziga kaj esperanttema.
Bonan feriadon al vi ĉiuj kaj... rendevuo ĉe TEA-sidejo vendrede la 2an de septembro!

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo: Via del Coroneo 15 - Trieste - marde 17-19; vendrede 19-21
Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio
Tel: (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscalinet.it
Grupa ttt-ejo://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina
Poŝtĉekkonto N° 10834349